# internacia pedagogia revuo


Photo UNICEF N° 1859

3-a Jaro Januaro-Februaro N° 1

3-a Jaro. Januaro-Februaro 1958.

# Internacia pedagogia revuo

(*eks ESPERANTO kaj KULTURO; Internacia Pedagogia Revuo*)

Aperas dumonate sub la aŭspicioj de la franca asocio de esp-edukistoj (GEE)

## NIA KOVRILO

Ni havas la plezuron danki ĉi-tie S-inon Pierre JULLIEN el Parizo, kiu desegnis la kovrilon de nia revuo, kiu nun aperas kiel moderna kaj inda reprezantanto de nia movado.

En tiu eleganta kadro ni havas despli da plezuro aperigi serion da fotoj, kiujn afable sendis al ni UNESKO. Tiuj fotoj apartenas al serio de foto-afiŝoj kun teksto en Esperanto eldonitaj de UNESKO kun helpo de Universala Esperanto Asocio, kiu ilin disdonas.

## LA HODIAUA FOTO

### Honduraso

« La lecionon de la malsato neniu instruisto povas forviŝi el la mensoj de siaj lernantoj... kaj infanoj ne povas atendi kun malplenaj stomakoj ĝis planoj pri ekonomia evoluigo maturiĝas. La Unuiĝintaj Nacioj estas povigitaj doni krizan helpon per UNICEF (Internacia Infan-Fondaĵo de Unuiĝintaj Nacioj), kiu alportas lakton, medicinan prizorgon kaj aliajn necesaĵojn al tiuj, kiuj plej urĝe bezonas ilin. Sen tia helpo, la ĝermoj de edukado estus en multaj landoj dissemitaj sur neproduktivan, malfekundan grundon ».

## ENHAVO

Paĝo 1. — **Omaĝo al Comenius** (G. Calô).
— 3. — **Dana Edukado** (P. Thorsen).
— 7. — **Instruado en Hungarujo** (A. Gauder).
— 9. — **« Dek-Unu Plus »** (G. Stanford).
— 12. — **Ho, tiu-ĉi Junularo** (P. Balkanyi).
— 14. — **Libroj por infanoj.**
— 15. — **Infana Pentroarto** (C. Dejoux).

**Ĉion por la redakcio:** artikoloj, informoj, recenzotaj libroj, oni sendu al la **Redaktoro:**

A. ALBAULT, 8, avenue Et. Billières
TOULOUSE (Francio).

**Ĉion pri administrado:** abonoj, provsendoj, specimenoj, oni sendu al la **Administranto:**

DELAGNEAU, Avrolles
par ST-FLORENTIN (Yonne) - Francio.

**ABONO:** 500 fr.F. pojare: vidu 3-an kovrilpaĝon.

**Anoncetoj, reklamoj,** oni sendu al: F-ino G. JOUBERT, 21, rue Regnault, SAINT-QUENTIN (Aisne) - Francio. P.Ĉ.K. LILLE 3041-30.

**TARIFO:** Anoncetoj; 6 fr.F. = 0,20 stelo po vorto aŭ mallongigo.

Reklamoj: 1/1 paĝo 5.000 fr.F.
1/2 paĝo 3.000 fr.F.
1/4 paĝo 1.600 fr.F.
1/8 paĝo 900 fr.F.
1/16 paĝo 500 fr.F.

Rabato 10 % por sama teksto en 2 numeroj.
20 % por sama teksto en 3 numeroj.

---

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la koncernan adreson antaŭ la 20a de la antaŭa monato.

La revuo aperos fine de marto, majo, julio, septembro, novembro.

**Giovanni CALÒ**

# O MAĜO AL COMENIUS




Comenius (Jan Amos Komensky 28 Mar. 1592-15 Nov. 1670), kiun Michelet nomis « Galileo de l'edukado », kiel ĝia, protagonisto, per jubilea Jaro 1957/8 — (la tricenta datreveno de l'eldono de lia pedagogia verkaro « Opera didactica omnia » en Amsterdam) — solene estas memorigata de Unesko. Car Comenius per la raciigo de pedagogiaj metodoj planis alirebligi al ĉiu homo certan kulturnivelon kaj fakprofesian kapablecon por tiel humanigi la antagonismojn en la Socio. Bedaurinde li ne plu sukcesis mem redakti la verkojn « pansofiajn » kaj « Konsulton pri amendo de homaj aferoj », kiuj eĉ perdiĝis en forgeso. Nur en jaro 1935 oni retrovis ilin en la orfeja biblioteko en Halle (Saale, GDR) kaj la Ĉekoslovaka akademio de sciencoj en Praha nun preparas eldonon kompletan.

La artikolon de la mondkonata komeniologo profesoro Giovanni Calo el « Chronique de l'Unesco » N° 7/1957 esperantigis kun permeso

Jana Cichova /Praha/

La ĝenerala Konferenco de Unesko en la naŭa kunsido en New-Delhi decidis, ke Unesko partoprenu la rememorigon de tricentjara datreveno de la publikigo — 1657 en Amsterdam — de la « Opera didactica omnia » de Comenius. Unesko ĉi-okaze ankaŭ eldonas unu volumon da elektita tekstaro el liaj verkoj.

Comenius certe meritas tian rekonon kaj tute legitima estas la speciala omaĝesprimo de Unesko. Pri tio mi estas tiom pli firme konvinkita, ĉar mi tradukis en italan lingvon kaj komentis gravajn tekstojn el lia « Didactica magna ». Tial mi povas esti prave dankema al tiu ĉi glorfama ĉeha pedagogo, ĝojante ke mi kontribuis al diskonigo de liaj pensoj en seminariaj lernejoj kaj universitatoj en nia lando.

## GRANDA SPIRITO

Eminenta edukanto — unu el la plej grandaj, kiun la homaro kon-spertis ĝis la nuntempo — Comenius antaŭ ĉio estis granda spirito, « anima candida » ekzemple nobla. Entuziasme li partoprenis en la komunio de Moraviaj fratoj. Por li la kristanismo submasonis ĉiun vivsencon kaj donis al edukado la karakteron de religia misio.

Lia arda kredo faris lian mentalecon neskuebla kaj lian apostolecon neniam laciĝema. Dank'al ĝi li estis kapabla superi tiom da malfaciloj kaj persekutoj, trompiĝoj kaj suferoj, de kiuj lia koro estis afliktita. Ĉiam esperema li neniel ĉesis finlabori pri siaj prempensoj.

Tridekjara milito gravege suferigis, eĉ dispeligis membraron de la Komunio, kiu estis al li tiom kara. La milito forrabis liberon de lia patrolando, kiun li adoris. Post perdo de l'edzino kaj infanoj, post ruinigo de liaj loĝejo, biblioteko kaj manuskriptoj, li devis elmigri. Li tramigris plurajn landojn serĉtrovante rifuĝejon. Sed malgraŭ tio Comenius ne perdis la kredon al humaneco, kies palingenezo devos plenumiĝi, kiel li opiniis, per edukado de sinsekvaj generacioj.

Apartenante al asocio religia, kiu alteniĝis al Jan Hus movado de la dekkvina jarcento, Comenius zorgis fidele daŭrigi tion, kio ŝajnis al li bazfundamenta kai esenca en la kristanismo. Tial li devis kondamni reformantojn, kiuj kontestis la liberon de homvolo kaj subtenis teorion de la « servum arbitrium ». Ĉiam li kredo-konfesis Kriston la Savinton, kiu helpis al homo retrovi la originan liberon. Comenius neniam dubis pri la bonvolemo de primitiva homnaturo — vidante en infananimo la ŝprucfonton de tiu ĉi bonkoreco. Profundege li amis infanojn kaj ĉiam traktis ilin kun respekto. Konvinkita, ke ili estas la nemortema promeso de la humaneco renovigita de Kristo, kies redescendon sur teron li atendis laŭ sia kredo hiliasma. Arda adepto de l'idealo porpaca, en kontakto kun kelkaj plej noblaj kaj plej antaŭvidantaj grupoj de sia epoko, l'aŭtoro de la « Didactica magna » dum sia tuta vivo predikis toleremon, pacon, fratecon inter popoloj revante pri la homaro spirite unuigita dank' al religio, scienco kaj edukado.

Fortika per sia konvinkiteco, mirige aktiva, Comenius kvindek jarojn dediĉis al favor-skribo por la religio, paco, patrolando. Li per la admonoj al toleremo kaj akordiĝo plurfoje eĉ kontribuis al solvo en politikaj konfliktoj disŝirantaj tiaman Eŭropon. Li postulis radikalan reformon de lernej-sistemo kaj pedagogiaj metodoj. Mem instruante li uzis novajn edukilojn kaj preparis novajn kompendiojn por la lernantoj. Lia verkaro estis grandnombra. Kiel pedagogo li infiluis decidige la kulturvivon en Eŭropo, en siaj landoj kaj poste en Pollando, Hungario, Germanio, Svedio, ĝis en Anglio kaj Nederlando.

## LA PIONIRO

Sur ĉi-tiu kampo Comenius fariĝis pioniro en teorio samkiel en la praktiko. Fakte li estas la unua, kiu penis ekipi la pedagogion per karakterizoj de efektiva scienco; sub la influo de Bacon kaj Campanella — admirante ilin — li aniĝas favore al naturalismo. Fiksante la leĝojn de l'edukado li sekvis tiujn de la vivo. Por anstataŭigi verbalismon per realismo, li postulas praktikan lernigon de lingvoj. Li antaŭzorgas pri aranĝo de infanvartejoj. Comenius estis ankaŭ favora al metodo intuicia — al « aŭtopsio » — kiel li ĝin nomis pro senpera observado de konkretaj objektoj; hodiaŭ ĝi estas nomata la « didaktika aktiveco ». Li asertas, ke la edukado devas esti la frukto de bone organizata kunlaborado de instruisto kun lernantoj: instruado en la lernejo — konceptita kiel « officina humanitatis » — fariĝos des pli utila, ju pli multnombrajn praktikajn lecionojn ĝi implicos, ju pli multe da infanoj ĝi kuraĝigos al meminiciato.

Comenius ne malatentis insisti — kun klarvido tute moderna — pri socia aspekto de l'edukado konsiderante, ke ĉiuj devus profitpovi el ĝi sen iu ajn diskrimino. Li ja opiniis, ke elspezo de tiu ĉi edukado utile revenos al la Socio.

Oni facile komprenas la admiron de la juna Leibnitz al Comenius kaj entuziasmon manifestatan de Herder, kiam fine de la dekoka jarcento li malkovris la ideojn de la granda ĉeha pedagogo. Tiu ĉi ankoraŭ hodiaŭ restas por ni la majstro de la moderna edukado. Kaj la ardo, kun kiu li ne ĉesis lukti por la rekono de la homrajtoj, por evoluigo de mutualismo tuthomara kaj por firmigo de la paco per helpo de l'edukado, scienco kaj kulturo envicigis lin en la avangardon de Unesko.

En Amsterdam Comenius trovis finfine necesan trankvilon por mediti kaj labori. Tie li mortis en 1670, post kiam en jaro 1657 aperis lia verkaro « **Opera didactica omnia** », antaŭ ĉio la « **Didactica magna** ». Tiu ĉi evento estas grava tempolimo en la historio de la pensado. Unesko, partoprenante la rememoron al Comenius esprimas omaĝon al aŭtoro, kies ideoj samtempe estas celebrataj kiel ĝiaj propraj.


*Poul THORSEN*

# DANA EDUKADO

Poul Thorsen, dana instruisto kaj aŭtoro de « Rozoj kaj Urtikoj » ne bezonas presenton antaŭ esperantista publiko. Ni publikigas ĉi tie tekston de prelego, kiun li diris en kunveno de la gratulinde agema « Komuna Konversacia Klubo ». Ni ĝojas ke la nuna amplekso de IPR ebligis al ni fine aperigi tiun tekston, kiu atendis de longaj monatoj.

En Danlando ĉiuj normaluloj scias legi kaj skribi. Ekde 1814 ni havas **instrudevon** por ĉiuj infanoj inter 7 kaj 14 jaroj. Ni ne havas lernej-devon, do gepatroj rajtas zorgi pri instruo al la infanoj per privataj lernejoj aŭ tute private. Oni nur unufoje jare prezentu la infanojn antaŭ pedagoga fakulo, kiu kontrolu, ĉu la infanoj estas edukataj. — Tamen malpli ol 8 % vizitas privatlernejojn, kaj dum 1951 nur 254 infanoj estis tute private instruataj. La granda amaso de l'infanoj, ĉu de riĉaj ĉu de malriĉaj hejmoj, vizitas senpage la komunumajn lernejojn. Tiel estas, ĉar la kvalito de la publika lernejo konstante kreskis, sekve ankaŭ la estimo al ĝi.

Antaŭ 100 jaroj estis alie. Tiam oni parolis pri la « nigra » lernejo, kie oni tre celis la komprenon, sed plie la kopiadon kaj parkeradon. Kontraŭ tio opoziciis Grundtvig kaj Kold, la solaj danaj kontribuantoj al la mondpedagogio. Ili estis kontraŭ parkerumo kaj troa legado de nekomprenataj kaj nekompreneblaj libroj. Ili volis veki, vivigi antaŭ ol klerigi, instrui. Ili ne bezonis multajn instruilojn. Por ili rakontado de la instruisto estis la ĉefaĵo, la t.n. **vivanta vorto.** La infanoj entuziasmiĝu pri la lernado. La instruisto infektu ilin per sia iniciato kaj ekzemplo, tiel ke ili neniam haltos, post kiam li startigis ilin. — Kold nomis sian lernejon **libera lernejo.** Tamen ĝi estis pli libera por la instruisto ol por la lernantoj. Iam tiaj lernejoj estis tre oftaj en nia lando, sed nun ili malaperas, ĉefe ĉar la ideoj de Kold grandparte penetris en la publikan lernejon. Kvankam la ŝtato subtenas per 80 % el la elspezoj, en la jaro 1951 restis nur 372 privataj lernejoj, el kiuj eĉ multaj ne havas rilaton al la ideoj de Kold, ekz. 16 estas germanaj.




*Diagramo de la dana lernejo*

Ĉar nur estas 7-jara deviga instruo, foje okazas, ke infanoj volas eksiĝi post 2-a au 3-a ŝtupo de la ekzamena linio, sed tio nur povas okazi, se la lerneja direktoro kaj la gepatra komitato konsentas.

Ankaŭ alie la gepatroj havas influon. La gepatraj komitatoj, elektitaj plej ofte laŭ politikaj listoj, inspektas nezorgatajn kaj nezorgemajn infanojn. Ili havas socialajn kaj higienajn taskojn, planas kunsidojn por gepatroj, fiksas datojn kaj formojn de jarfinaj aranĝoj, k.s. — Ili ne rajtas inspekti la instruadon, sed gaste ĉeesti. Ili povas plendi pri instruisto, sed ne rekte, nur al ties ĉefo.

La ekzamena linio estas tre populara. En 1951 troviĝis en ĝi ĉ.17 % de ĉiuj instrudevaj infanoj. Por eniri oni trapasu skriban ekzamenon pri dana lingvo kaj kalkulado, krome la instruistoj de la koncernaj infanoj havas gravan influon pri la allaso. Danaj mezlernejoj ekzistas ekde 1903, kaj en Danio ili malpli estas perilo por gimnazio-universitato ol memstara lerneja formo kun finita temaro.

La reallernejo estas pli ekskluziva. En ĝi troviĝis en la jaro 1951 2,1 % (kalkulita el la lernejdevaj infanoj, malpli ol 14-jaraj). La disciplinoj estas kompreneble pli realaj, tuŝantaj la praktikan vivon, administracion, komercon kaj ĝeneralan klerigon sufiĉe vastan.

En gimnazioj troviĝis en la jaro 1951 1,9 %. En reallernejo la seksoj estas egale reprezentataj, sed en gimnazioj iom superas knaboj. La gimnazio havas tri liniojn : modernlingvan-humanan, matematikan-sciencan kaj klasiklingvan (grekolatinan) ; ĝi preparas por la universitato, sed tamen havas propran, finitan temaron.

En 1950 estis en **ĉiuj** lernejoj 511.000 lernantoj. El ili 93.000 aŭ 18,2 % troviĝis en la ekzamena linio : mezlernejo, reallernejo, gimnazio. Tamen la ceteraj 82 % preskaŭ ĉiuj ricevas sub iu formo pluan instruadon ol donas la popola lernejo. Metilernantoj vizitas teknikajn lernejojn, aliaj vizitas junullernejojn por senfakuloj. Krome ekzistas popolaj altlernejoj, agrikulturaj kaj dommastrumaj lernejoj, vesperkursoj tre variaj (senpaga instruado) kaj preparaj kursoj, kiuj ebligas realekzamenon post dujara studo. Fine oni povas nomi vesperajn gimnaziojn kaj vesperajn seminariojn por estontaj instruistoj.

La vesperkursoj aŭ vesperlernejoj estas tre ampleksa kaj varia institucio. Vintre 1950/51 vizitis ilin 261.000 gejunuloj. Preskaŭ ĉiu temo estas instruata tie, ofte sub tre liberaj formoj, kaj la tuta instruado estas senpaga. Se minimume 15 personoj volas studi temon, egale kiun ajn, ili povas disponi ejon kaj salajron de instruisto, eĉ se ili instruas sin reciproke en studrondoj. Kompreneble ankaŭ la Esperantomovado estas favorata de tiu ĉi sistemo.

Aparta fenomeno de la dana demokratio estas la eblo transiri al pli alta studo post kelkaj jaroj en la praktika vivo. Oni allasas al instruistaj seminarioj junulojn tute sen ekzameno nur post prepara kurso. Tiuj estas nomataj « Viroj de la plugiloj », sed nuntempe pli trafe estus la esprimo « viroj de fabrikoj » aŭ « virinoj de domservo aŭ industrio ».

Ankaŭ la establo de vespergimnazioj kaj vesperseminarioj en multaj lokoj estas, kvankam tre peniga formo de studado, pruvo de demokratigo de la instruado.

Oni ankaŭ enkondukis la saman « transsaltan » principon en la infanlernejon mem. Ekde 1951 infanoj povas pasi la 3-an ŝtupon de la senekzamena mezlernejo al la 3-a ŝtupo de la ekzamena mezlernejo en urboj, kiuj aranĝas specialajn klasojn tiucele.

Kompreneble ankoraŭ ekzistas en nia lando problemo pri inteligentaj infanoj en la izolita kamparo. Sed oni klopodas per lunlaboro inter provincaj komunumoj krei pli da centraj mezlernejoj, kaj la komunumo kontribuas al transport-elspezoj. Kelkloke oni praktikas apartajn kursojn por pli kapablaj lernantoj, kiuj do povas resti en sia medio kaj tie sin prepari por ekzamenoj.

Laste eĉ la severa universitato malfermetis pordon al la popolo donante eblon por tiaj instruistoj, kiuj ne trapasis la gimnazion kaj ne estas akademiuloj, aliĝi almenaŭ al la universitata studo de psikologio.

Kiel oni konstatas, en Danio ne estas unueca lernejo, sed dubranĉa lernejo. Venas nuntempe multaj proponoj pri unueca lernejo ĝis la 15-a jaro. La dividon anstataŭu apartaj kursoj pri lingvoj kaj matematiko. La venontaj jaroj apenaŭ montros efektivigon de tiuj ĉi planoj, sed kredeble plua disbranĉiĝo.

Momente la klasinstruo estas plej ofta. Oni instruas la samajn temojn al ĉiuj samtempe. Tamen ekzistas, speciale sur kamparo, natura grupdivido kaj sporade eĉ individua instruado.

Teminstruo foje okazas. Oni ignoras la hortabelon kaj elektas anstataŭ : historio, geografio, sociologio, gepatra lingvo, skribado, desegnado ktp., instrui per ĉiuj samtempe, specialajn temojn, ekz. la dana tero, okupoj de la dana popolo, la dana erikejo (reale kaj poezie!) nia urbo, nia pratempo ktp. Teminstruo estas ĉefe aplikata en la senekzamena linio, sed certe ĝi estus eĉ pli bone aplikebla inter la ekzamenuloj.

Unufoje dum sia lerneja vivo infanoj de pli grandaj urboj venas al kampara aŭ tendara lernejo por dum du semajnoj studi naturon, ekonomion kaj kulturon de la koncerna regiono. Ili vivas kune kaj laboras kune, verkante ilustritajn raportojn.

Ekzistas du tendencoj rilate nian infanlernejon. Unu klopodas mildigi la premon de la ekzamenoj en la ekzamena linio, alia volas reformi la senekzamenan linion, valorigi ĝin tiel, ke ĝi fariĝos alloga, konkurencpova kompare kun la ekzamena linio. Pri tio la instruministro promesis larĝan esploron, kiu sendube post nemultaj jaroj efikos tute novan instruprogramon kun eĉ pli praktike akcentita perspektivo.

En lernejoj, kie la komunum-estraro decidis por tio, ĉiuj infanoj povas sen formalaĵoj havi senpagan, speciale nutran, vitaminriĉan lunĉon. Tamen pro ĝenerala ŝparo oni limigis en 1951 la manĝosezonon ĝis 6 monatoj, kaj nur la 6 unuaj klasŝtupoj povas ĝin partopreni.

En ĉiuj urboj funkcias psikologoj en esploro de pli malfacilaj infanoj kaj eventuala lokigo en apartaj klasoj au kursoj.

Ĉe ĉiuj kopenhagaj lernejoj deĵoras plurfoje semajne kuracisto, kaj minimume unufoje jare dentisto esploras ĉiujn infanojn. Ankaŭ estas banejo en ĉiuj kopenhagaj lernejoj.

La granda plimulto de danaj lernejoj havas instruon komunan por ambaŭ seksoj. La knaboj lernas slojdon (*), la knabinoj mastrumon kaj kuiron. En la senekzamena linio dum duona jaro oni interŝanĝas lecionojn, tiel ke la knabinoj lernas slojdon kaj la knaboj la inajn okupojn. Por knabinoj certe bonutilas manumi ilojn, kaj por knaboj en skolta vivo (aŭ kiel fraŭloj kaj edzoj) sendube utilas mastruma kaj flika konoj.

Oni instruas korpan higienon, inkluzive la seksvivon. Ĉiam la geinstruistoj prizorgas tiun ĉi disciplinon, tamen ne en difinitaj lecionoj aŭ laŭ instruplano, sed kiam estas okazo, ekz. en natursciencaj aŭ prihigienaj lecionoj.

Religio estas instruata en ĉiuj lernejoj, kaj eĉ rajtas inspekti la parokaj pastroj, sed malofte okazas, kaj ĉiu infano povas liberiĝi de la religi-instruo per simpla peto de la gepatroj. Tamen tre malmultaj petas liberigon.

Danio estas lando ĉe la maro, kaj la plimulto scias naĝi. Ĉe tre multaj lernejoj oni, kadre de gimnastiko, instruas tiun arton.

Multaj urbaj lernejoj disponas pri ĝardenetoj, kie la infanoj povas en la lecionoj aŭ post lerneja tago kulturi peceton da tero sub zorga gvido. La infanoj posedas la produktojn, sed pli gravas, ke ili akiras estimon kaj konon al korpa, praktika laboro kaj amon al la naturo.

Plej multaj lernejoj havas bibliotekon, ofte kun legejo, kie sperta asistanto instruas kiel elekti, uzi kaj trakti librojn kaj revuojn.

En ĉiuj ĉefurbaj lernejoj ekzistas filmaparatoj (en kelkaj eĉ sonaj), per kiuj eblas regule montri instruajn filmetojn el kampoj geografia, botanika, scienca, etnografia ktp.

Oni sendas per radio apartan programon tre bone ellaboritan por la lernejoj. Fakte ekzistas tri diversaj programoj laŭ aĝo de la infanoj. Temas pri tre trafaj kaj vivaj elsendoj, kiuj bone ilustras la instruplanojn. Specialaj presaĵoj aperas por kaj infano kaj instruistoj. Per ili la instruisto preparas la temon kaj post la elsendo ĝin diskutigas. Oni komencis en kelkaj lernejoj surbendigi la elsendojn, unue por konservi ilin entute, due por utiligi en pli konvenaj lecionoj. Car kvankam la programo ĉiam estas almenaŭ unufoje ripetata en alia tempo, ofte estas malfacile trafi la ĝustan elsendon je la ĝusta tempo kun la ĝusta klaso, — Teknike oni aranĝas unu radioaparaton en ĉiu lernejo kaj kelkajn specialajn parolilojn facile munteblajn en la diversaj klasĉambroj.

Rilate al instruplanoj: Tiaj ekzistas, sed ĉefe kiel konsilaro por la instruistoj, kiuj ne estas ligitaj al difinitaj metodoj, sed povas libere procedi, se ili nur atingas adekvatajn rezultojn. Tial multaj instruistoj eksperimentas pri novaj metodoj. Precipe la individua instruformo kaptis multajn. Oni iom malhelpas la eksperimentadon, ke ofte troviĝas 36-38 infanoj en la klasoj, komprenebIe tro multaj por individuigi.

Momente estas kreskeganta nombro da infanoj kaj konsekvenca manko da instruistoj kaj klasĉambroj. Dum la germana okupado devis tute ĉesi konstruado de lernejoj, kaj nur ege malrapide oni ekkonstruas en postmilitaj jaroj. La landa organizo de instruistoj deklaris, ke necesas konstrui lernejojn je minimuma kosto de 1400 milionoj da kronoj, sed efektive dum 1951 oni konstruis je kosto de 46 milionoj da kronoj.

---

(*) *Slojdo*, alilande simple nomata manlaboro, manekzerco aŭ simile. Red.

En ĉiuj urboj mankas klasĉambroj por doni altnivelan instruon. La lernantoj devas moviĝi de ejo al ejo dum la tuta tago por trovi ĉambron momente vakan. Ekz. en mia lernejo estas 29 klasoj, sed nur 20 ejoj. Tial oni devas vastigi la restadon de la instruistoj ofte de la 8-a ĝis la 16-a horo, kaj tre multaj deĵoras ĝis 40 horoj semajne.

En multaj lernejoj oni starigis lignajn barakojn (heredaĵo de la germanoj), kie oni gimnastikas aŭ estas alie instruataj.

La nomitaj malfacilaĵoj kompreneble igas la infanojn malpli facile trakteblaj. Kontribuas al tio perioda timo je milito. Sur multaj lernejoj oni starigis kontraŭaviadilan sirenon, kiun oni diligente ekzercas! Kontribuas ankaŭ al konfuzo la fluo de tro ekscitaj filmoj kaj « koloritaj » kajeroj, kiuj evoluigas la plej primitivajn ecojn en la infanoj.

Tamen ne mortis la optimismo. Postmilite la ŝtato ekfavoris la progreseman pedagogion disponigante al modernaj instruistoj propran eksperimentan lernejon, t. e. la kolosa lernej-palaco, kiun konstruigis la germanoj en Kopenhago por siaj infanoj post la venko. Ironio de la sorto estas, ke ĝi nun servas kiel esplorejo pri plej liberaj formoj de dana pedagogio.

Ŝajne ĉiam post grandaj militoj sekvas pedagogia eksperimentemo. Prave-malprave oni sentas, ke pli bona edukado eble povas savi la homaron de pluaj kataklismoj — Tiel post la unua mondmilito ekestis la **internacia altlernejo ĉe Elsinoro,** kie gejunuloj el plej diversaj landoj kune laboras spirite kaj fizike. Ideo de tiu altlernejo i. a. estas eduki per komuna fizika laboro almenaŭ unu horon tage.

Post la dua mondmilito ekestis en Kopenhago internacia infan-lernejo, **La Bernadotte-Lernejo,** privata, sed subtenata de la ŝtato; ĝi arigas diversnaciajn infanojn, malfeliĉe ankoraŭ nur per naciaj lingvoj, sed ĝi praktikas internacian komunecon sub tre liberaj, individuaj formoj. Eble tio povas prezenti perspektivon pri estontaj formoj de infanlernejoj, perspektivon pri kunlaboro tutmonda inter instruistoj kaj infanoj en nia tro dividita mondo.

**La instru-problemoj tre diversas tra la mondo**

En la sekvaj numeroj de IPR vi legos:

- La teknikaj mezlernejoj en **Aŭstrujo,** de D-ro Ernesto Jozefo Gœrlich, Supera Studa Konsilisto.
- Kelkaj karakterizaĵoj de la **Franca** ŝtata instruado, de F. Cadenel, inspektoro de la unuagrada instruado.
- Socia administrado de la lernejoj en **Jugoslavio,** de F. Novljan, emerita profesoro.

## *Esperantista Pedagogia Semajno subtenda en Svislando*

De la 21-a ĝis la 31-a de julio 1958 okazos en Broc, Gruyère-Greyerzlando, belega montara regiono de Svislando, internacia pedagogia semajno esperantista por geinstruistoj kaj iliaj infanoj. Aliaj gesamideanoj estas kore invitataj. La Esperantista Pedagogia Semajno okazos **sub persona tendo.** (Ebleco dormi sur pajlo en tute primitiva kamparana domo).

Organizantoj: L. Lentaigne, instruisto, Montpellier, gvidanto de Esperanto-fako de KIMIL, (Freinet-metodoj), kaj M. Erbetta, instruisto gvidanto de Grajnoj en Vento.

Informojn kontraŭ internacia respondkupono aŭ UL-stelo sendas:

Grajnoj en Vento,
Marcel Erbetta, rue des Pins 66,
**Bienne Biel** 7, Svislando — Suisse

## NI RICEVIS

**PIONIR:** infangazeto el ZAGREB: n-oj 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 16, 17, entenas unuajn lecionojn de Esperanto-kurso ilustrita.

**KISALFOLD:** taggazeto el GYOR, Hungario, entenas Esperanto-lecionojn redaktatajn de Ladislao Kulcsar.


**GRAJNOJ en VENTO:** interlerneja gazeto: Unua Rondo, nº 6; Dua Rondo nº 3.

Andreo GAUDER

# Kelkaj datoj pri la instruado en Hungarujo


Hungarujo havas proksimume dek milionojn da loĝantoj nuntempe.
Jen la nombra kresko de la lernantoj:

**Nombro de la unuagradaj lernantoj:** ⟶




La instruado ekkomencas en la sesa jaro de la lernantoj kaj ĝi estas deviga, kaj senpaga. Oni havas 8 klasojn en la unuagradaj lernejoj.


**Nombro de la mezlernejaj lernantoj:** ⟶




La instruado ekkomencas en la 14-a jaro de la lernantoj, post fino de la unuagradaj studoj, ĝi ne estas deviga. La mezlernejo konsistas el 4 klasoj kaj finiĝas per abiturienta ekzameno.

Jen la dispartiĝo de la lernantoj laŭ popoltavoloj:


**haĉita:** laborista deveno
**nigra:** kamparana deveno
**blanka:** alia deveno




En la mezlernejoj (gimnazioj) oni havas du sekciojn: la humanan kaj la realan. Illi diferenciĝas nur en kelkaj studobjektoj kaj en la nombro de la lecionhoroj. Depost la I-a de septembro oni instruas la sekvajn studobjektojn en la hungaraj mezlernejoj:


| studobjektoj | sekcio: | humana | | | | reala | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | klasoj: | I | II | III | IV | I | II | III | IV |
| 1. Hungara lingvo kaj literaturo | | 5 | 4 | 5 | 5 | 5 | 4 | 4 | 4 |
| 2. Historio | | 3 | 3 | 4 | 4 | 3 | 3 | 3 | 4 |
| 3. Rusa lingvo | | 3 | 3 | 3 | 3 | 3 | 3 | 3 | 3 |
| 4. Dua fremdlingvo | | 4 | 3 | 3 | 3 | 3 | 3 | 3 | 3 |
| 5 Matematiko | | 5 | 5 | 4 | 3 | 5 | 5 | 4 | 4 |
| 6. Geometrio | | — | — | — | — | — | — | 2 | 2 |
| 7. Fiziko | | — | 2 | 3 | 5 | — | 2,5 | 3,5 | 5,5 |
| 8. Kemio | | 3 | 2 | 2 | — | 3 | 2,5 | 2,5 | — |
| 9. Biologio | | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 |
| 10. Geografio | | 2 | 3 | 2 | — | 2 | 3 | 2 | — |
| 11. Historio de la arto | | — | — | — | 2 | — | — | — | — |
| 12. Kanto | | 1 | 1 | — | — | 1 | — | — | — |
| 13. Korpedukado | | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 |
| posemajnaj lecionhoroj | | 30 | 30 | 30 | 30 | 31 | 31 | 31 | 30 |

**Nombro de la universitataj kaj altlernjaj lernantoj:**




La instruado ekkomencas post la abiturienta ekzameno, ĝi ne estas deviga, ĝi daŭras laŭ fakultatoj 4-6 jarojn.

Jen la dispartiĝo de la lernantoj laŭ popoltavoloj :




Prof. Andreo GAUDER.

La unua artikolo de Prof. A. Gauder, pri instruado al minoritatoj en Hungario (I.P.R. nº 5 - majo 1957, paĝo 58) elvokis certan intereson. Ni do opinias ke la jena artikolo bone kompletigas la bildon pri la instruado en tiu lando. - Red.

# 1958...

Via redaktoro ricevis, fine de l'pasinta kaj komence de l'nova jaro, tiom da bondeziroj, ke materiale ne eblas respondi al ĉiu des pli ke la normala kuriero estas jam tre ampleksa. Al tio aldoniĝis la plia zorgado pro la nova I.P.R. Ni do devas respondi kolektive!

Estas vere ĝojige vidi, kiel niaj legantoj jam ŝatis sian I.P.R., malgraŭ ĝia neperfekta formo! Ili ja sentis, ke temas pri evoluanta entrepreno, pri gazeto en kreado kaj ili kore nin subtenis por ke ni povu progresigi ĝin! Ni tre kore dankas vin, karaj legantoj! Ni esperas ke la hodiaŭa I.P.R. portos al vi almenaŭ partan kontentigon, rekompencon pro via kora subteno; ĝi ja ne estas perfekta, sed kune kun vi, ĉiuj per unu movo, ni certe povos atingi pli altan nivelon.

Kun firmaj esperoj al pluaj progresoj, ni do eniras en la 3-a jaro de I.P.R., 3-a periodo.

Kaj al ĉiuj niaj legantoj ni kore deziras

BONAN NOVAN JARON.

# La estinto, estanto kaj estonto de "Dek-unu plus"

*Artikolo el la angla semajna gazeto « News of the World » de la 1-a de septembro 1957.*

*Speciala artikolo de Graham Stanford, enketo sub la aùspicio de « News of the World ».*

Ĉu vi deziras **argumentadon?** Se jes, nur menciu « Dek-unu Plus » en kiu ajn hejmo en Anglujo kaj en Kimrujo kaj nepre vi aùdos ĝin.

« Dek-unu Plus » estas la nomo donita al la ekzameno, kiu decidas ĉu infano estas pli taùga por eduko donata en liceo aù en alia tipo de lernejo. En Anglujo kaj en Kimrujo ĝi estas abomenata de la plimulto de la 6.500.000 geknaboj, kiuj lernas en la lernejoj administrataj de la ŝtato, ankaù de la plimulto de iliaj gepatroj.

Dum jaroj edukistoj kaj gepatroj argumentadas pri la justoj kaj la maljustoj de tiu ĉi metodo de elekto. Kaj milionoj da geknaboj vivis kaj vivas en granda timo pri ekzameno, kiu, kiel oni diras al ili, faros aù baros ilian estontan karieron.

Kuracistoj jam prezentis pruvon, ke tiu timego produktis ulcerojn kaj iajn nervajn malsanojn, kiuj antaùe apenaù estis konataj ĉe geknaboj.

Ĝi ja disrompis la pacon en milionoj da hejmoj. Nuntempe la malakordo pri la « Dek-unu Plus » estas same pasia kiel iam antaùe. Iuj lokaj edukaj aùtoritatoj decidis iom aliigi la formon de tiu ekzameno. Unu eĉ ĵuris nuligi ĝin kaj aliaj konsideras anstataùi ĝin per aliaj skemoj.

Intertempe ĉiuj edukistoj atendas la publikigon frue en tiu ĉi monato (Septembro 1957) de la raporto sur tiu ĉi temo de la Nacia Fondaĵo por Eduka Esplorado (National Foundation for Educational Research).

## Akcepto en liceo laù merito ne laù mono

Ni pristudu la pasinton de tiu speco de ekzameno kaj provu antaùvidi ĝian estonton.

Iuj diras, ke ĝi nepre mortos; aliaj insistas, ke ĝi devas resti netuŝata almenaù dum kelke da jaroj.

Estis la Akto pri Edukado de 1944, kiu unue ŝarĝis la lokajn aùtoritatojn provizi duagradan edukon al ĉiu lernanto en sia regiono.

Antaù la lasta milito 80 lernantoj el cent estis edukataj en unuagradaj lernejoj kaj 20 el cent en liceoj. El tiuj 20 el cent proksimume duono gajnis stipendion; la aliaj pagis por sia eduko.

Hodiaù 20 el cent iras al liceo, sed neniu el ili pagas, ĉiuj estas akceptataj pro merito. La restantaj 80 el cent estas dividataj inter duagradaj modernaj lernejoj kaj duagradaj teknikaj lernejoj je la proporcio de proksimume 70 el cent en la moderna kaj 30 el cent en la teknika.

Post la milito la naskiĝo de infanoj multe pliiĝis, sed ankoraù restas proksimume la sama malfacileco trovi lokojn en lernejoj por lernantoj.

## Nenia formulo

Lastan jaron en Anglujo kaj en Kimrujo 6.500.000 geknaboj estis instruataj en lernejoj ekipataj de la ŝtato — 1.000.000 pli ol en la jaro 1950. Edukistoj kalkulas, ke en la jaro 1961, kiu estos kulmina jaro, jam estos plimultiĝo de pli ol 250.000.

La Akto de 1944 lasis al la 146 lokaj edukadaj aùtoritatoj ellabori siajn proprajn skemojn por loki studentojn, post la fino de ilia unuagrada edukado ĝis la aĝo de dekunu jaroj, en taùgajn liceojn aù duagradajn lernejojn.

Nenia rigida « Dek-unu Plus » ekzameno estis sugestata. Ĉiu loka aùtoritato estas libera ellabori sian propran ekzamenon. La ekzameno en unu regiono malmulte similas al tiu en alia regiono.

Ankaù ne ĉie estas egala la nombro da lokoj en liceoj; ekzemple, en Merionethshire (provinco de Merioneth, Norda Kimrujo) estas lokoj en liceoj por 63 lernantoj el ĉiu cent, sed en West Bromwich (Okcidenta Bromwich) kaj en Nottingham la nombro da lokoj estas nur dek-unu el ĉiu cent kaj en Liverpool dek-kvar el cent.

Milionoj da gepatroj kaj multaj edukistoj kontraùparolis la skemon de la komenciĝo kaj daùre tion faras. Ili asertas, ke tiu « faru aù mortu » testo tiel frue en la vivo malebligas al miloj da geknaboj trovi lokon en liceo al kiu ili meritas iri.

## Ĉu inkvizicio ? La Prezo de Malsukceso

Pluraj edukistoj diras, ke jam ekzistas danĝera inkvizicio al geknaboj, kies gepatroj senĉese admonas pri la sekvoj, se ili malsukcesos atingi la normojn de liceoj.

Milionoj da geknaboj sentas, ke malsukceso « hundos » ilin (sekvados ilin, kiel hundo sekvas sian mastron) dum la resto de iliaj vivoj.

Gepatroj jam tamburadis al ili, se ili ne sukcesos... « eniri liceon, ke estos dubinde, ĉu ili povos akiri la ateston « Ĝenerala Atesto de Edukado » (General Certificate of Education = G.C.E.) (ekvivalenta al la antaŭ-milita abiturienta atesto), kiun preskaŭ ĉiu laborestro postulas.

Alia grava punkto, kaj de gepatroj kaj de edukistoj, estas, ke tia decidiga testo je la aĝo de dek-unu jaroj ne estas justa kontraŭ infanoj, kies cerboj evoluas nerapide.

Ili ne akceptas la respondon de lokaj aŭtoritatoj, ke, se iu infano montras veran kaj specialan talenton, li aŭ ŝi, ĝis la aĝo de dektri jaroj, eble, estos aŭtomate sendata al iu liceo. Tiaj transsendoj, ili asertas, malofte okazas.

Unu elstaranta edukisto diris al mi, ke la nuna metodo estas plene malfermita al misfaroj kaj al anomalioj.

## Skribista Eraro

Li citis, ke knabo en la nordo de Anglujo faris ne brile sian « Dek-unu Plus » on. Tamen, pro eraro de skribisto, li estis asignita al liceo. Baldaŭ la eraro estis eltrovata. La loka eduka komitato atente konsideris la dilemon; ĝi decidis silenti pri la eraro kaj lasis la knabon en la liceo. La knabo prenis ĉian avantaĝon de la eraro; li energie studis kaj sukcesis en ĉiu ekzameno tiel, ke li boris sian vojon al la universitato en Kembriĝo.

Se tiu eraro ne estus okazinta, neniam li estus enirinta en liceon.

## 20 El Cent

Alia, egale kompetenta kaj sperta, edukisto deklaris, ke nur 20 el cent de niaj geknaboj estas kapablaj profiti de la akademia instruado donata en liceoj.

« Ne ĉiuj gepatroj deziras, ke iliaj infanoj estu laboristoj en blanka kolumo », li diris, « precipe atentante la nuntempan direkton de salajroj. Duono de la gepatroj en Anglujo kaj en Kimrujo estas kontentaj pri la eduko donata en duagradaj modernaj kaj teknikaj lernejoj ».

Ĉefoficisto de la Nacia Fondaĵo de Edukada Esploro, kiu partoprenis en la enketo pri la skemo, diris al mi: « Tro da eraroj okazas ĉe « Dek-unu Plus » por lasi nin trankvilaj malgraŭ tio, ke ĝi estas bona ilo por sia celo ».

Klare ja estas, ke pluraj lokaj edukadaj aŭtoritatoj jam perdis fidon en ĝi, kaj ili ĉirkaŭrigardas por novaj rimedoj anstataŭi ĝin.

Leicestershire (provinco de Leicester - elp. Lester) enkondukas skemon, kiu eble faros ĝin superflua. Anstataŭ la nuna divido de duagradaj modernaj lernejoj en teknikan kaj modernan, estos komunaj altlernejoj, kien ĉiu infano iros je la aĝo de 11 jaroj post la fino de la unuagrada lernejo.

Ĉe la aĝo de 14 jaroj la eniro en liceojn estos certigata al ĉiuj geknaboj, kies gepatroj konsentos subtenadi lin aŭ ŝin en lernejo ĝis la aĝo de 16 jaroj aŭ pli. Tiel la fina decido, ĉu la infano iros al liceo aŭ ne, estos lasata al la gepatroj en tiu ĉi lando.

La edukada aŭtoritato de Leicestershire rezonas, ke tio eliminos ĉe unuagradaj lernejoj la danĝerojn de cerbo-remburado por la ekzameno « Dek-unu Plus », kaj, pro la plialtigo de la aĝo de lernantoj, la instruado en liceoj estos pli efika.

Super ĉio, ĝi forigos timon ĉe la publiko pri la « Dek-unu Plus ».

## La instruista vidpunkto

Pli kaj pli da aŭtoritatoj penas rompi la diferencojn inter tipoj de lernejoj.

Unu skemo estas provizi grandajn lernejojn en kiuj geknaboj povas aliĝi al licea, teknika, aŭ duagrada sekcio.

Londono kaj pluraj urbegoj en la provincoj jam havas tiajn lernejojn, kaj aliaj estas konstruataj.

## Kia estas la opinio de Geinstruistoj ?

Ĉefoficisto de la Nacia Unuiĝo de Instrunstoj (National Union of Teachers = N.U.T.) diris al mi, ke lia membraro opinias, ke la « Dek-unu Plus » elektoj estas ĝustaj je 95 el cent, kaj kvankam la ebleco erari estas malgranda, tamen, ĉia eraro estas ege grava. Pro tio ili bonvenigas ĉiajn eksperimentojn, kiujn lokaj edukaj aŭtoritatoj faras por eviti ilin.

La speco de elekto estas nepre necesa, diris la parolanto de la N.U.T. La problemo estas ĉu la elekto estu farata ekster la lernejo, kiel nuntempe, aŭ interne, kiel estas farata ĉe plurfakaj lernejoj.

« Ni bonvenigas la eksperimentojn en plurfakaj lernejoj » li aldonis. « Kelkaj estas bonegaj, sed ĉu ili estas taŭgaj por ĉiuj regiono, ankoraŭ devas esti pruvata ».

### Trovi Ĝobojn *

Ĉu rezulto de ekzameno estas grava?

Ĉu gepatroj estas pravaj pensi, ke estos preskaŭ neeble al iliaj gefiloj trovi « blank-kolumajn » ĝobojn, se ili ne posedas la ateston G.C.E.?

Jen kelkaj respondoj de reprezenta grupo de laborestroj. Londona Transporto: Por posteno ĉe la administra stabo ni postulas la G.C.E. por kvar objektoj, du el ili devas esti la angla lingvo kaj matematiko.

Nacia Departemento pri Karbo: Ni postulas edukan normon de G.C.E. de knaboj aliĝantaj al la oficeja stabo. Se iu knabo el duagrada moderna lernejo ne posedas ĝin, tio ne forŝlosos lin, ĉio dependas de la knabo.

Imperiaj Kemiaj Industrioj (Imperial Chemical Industries): Ni nepre postulas la plej altajn kvalifikojn en kelkaj fakoj, sed ni havas tian vastan amplekson da ĝoboj, ke G.C.E. ne estas necesega por kelkaj specoj de laboroj.

« Unilever » (Ĉefoficejo en Londono): la ĝenerala regulo estas, ke G.C.E. estas postulata, minimume la matematiko kaj angla lingvo de tiu normo.

Intertempe lokaj edukaj aŭtoritatoj ĉie en nia lando ellaboras sian apartan specon de « Dek-unu Plus ». Dum ili tion faras la karieroj de milionoj da niaj geknaboj restas sur pesilo.

Tradukis el angla lingvo,
E. E. YELLAND,
laŭ permeso de la aŭtoro.

---

(*) **ĝobo**: Angle: *job* (prononcu: ĝob (France: *Boulot*). Eble de *gobe* (el F. *gober*) kun la senco « buŝpleno » malgranda kvanto). — Angle oni diras: Kia estas via *ĝobo*, « *job* » (ĝobo) estas kuranta vorto jen por aparta laboro, jen por dumtempa laboro, kaj kun la signifo « aparta laboro », « nelonge daŭra laboro ». Nuntempe en angla lingvo ĝi ofte anstataŭas la vorton *work* (laboro).

Mi esperantigis la uzatan anglan vorton el la originala teksto. — E. E. Y.

---

## *NI LEGIS POR VI*

★

**INSTRUISTOJ KAJ LA LINGVO INTERNACIA** tre bona artikolo de J. P. BEAU, agregacia profesoro kaj instruisto de angla lingvo.

La kunvenoj en Marseille; I.P.R.; la aktivecoj en Gresillon; la instruistaj fakdelegitoj de U.E.A.; du bonegaj alineoj pri la pedagogia valoro de Esperanto; homara kontakto (germana E-revuo, nº 12, dec. 1957).

**JOHANNES KOIVU** 75 jara, multjara gvidinto de la instruista suoma esperanto ligo. Artikolo de Kajo en INFORMILO (roneotipita periodaĵo el Suomio).

**PEKINA POPOLA UNIVERSITATO** enkondukis Esperanton. Esperantaj grupoj fondiĝis en diversaj ĉinaj universitatoj. En PENGPU, Anhuej-provinco, grupeto de 14 gimnazianaj instruistoj entuziasme lernas Esperanton. (El Popola ĉinio nº 1, 1957 ĵus aperis).

**Pàl BALKANYI**

# *Ho, tiu ĉi nuna junularo... !*

★

Sub tiu titolo aperis artikolo en hungara ĵurnalo, kiu certe montras la demandon de la nuna junularo kaj de ties edukado ankaŭ por aliaj landoj. Tiu ĉi demando devas egale interesi edukistojn, instruistojn, gepatrojn kaj eĉ la junularon.

Jen sekvas la ĉefaj partoj de la artikolo kaj la plej gravaj ideoj kaj spertoj resumitaj.

En nia lando oni kelkfoje trompiĝis pri la nuna junularo. Kvazaŭ multjara instruado, edukado — almenaŭ en lernejoj, en junularaj organizoj — ne havus efikon aŭ havus nesufiĉan efikon. Oni kutimas jam diri « tia estas la nuna junularo » kaj ke « oni ne indas okupiĝi kun ili ». Kaj en nia lando, en la popoldemokratio oni zorgis, ke la junularo laŭeble ne havu malbonajn influojn : oni ne allasis la tro sovaĝajn modernajn dancojn, oni ne povis aĉeti la multajn kriminalromanojn kaj la — ankaŭ en okcidentaj landoj de edukistoj, de gepatroj kondamnatajn « Comics » kaj similajn ne altnivelajn legaĵojn, kiuj vekas la pli malaltajn instinktojn. Tiutemajn teatraĵojn kaj filmojn oni aŭ tute ne aŭ nur tre malofte montras en niaj filmteatroj. Ni ja ofte legis, ke en kelkaj landoj tiaĵoj tion ruinigas la animon de la infanoj, de la junuloj kaj eĉ la nuna usona televida prezentado per oftaj murdoj kaj similaj scenoj infektas kaj malbone influas.

Sed ŝajne tio ne estas ĉio ! Ni interesiĝus scii la opinion de alilandaj edukistoj, gepatroj, eĉ de junuloj ! Ĉar la junularo — kompreneble ne la tuto ! — perdis iom la senton de braveco, de ĝentileco, de ĝusta prijuĝo de la okazintaĵoj kaj ankaŭ de sia propra sintenado ! Tio montriĝis ne nur en tumulta tempo, kia estis la 1956-jaraj oktobraj okazintaĵoj, kiam multaj ne povis prijuĝi, kio estas por ili vere utila, kio estas socia progreso nepre defendenda, kio estas falsa « libero », do forĵetinda. Ankaŭ en la ĉiutaga vivo montriĝas difektoj ! Tio jam havas rilaton al la karaktero ! La edukistoj devas atenti tion !

Jen la gazeto rakontas kelkajn tiajn okazintaĵojn. Ekzemple junulo, kiu estis neinstruita, vaganta malriĉulo, estis zorge instruata. Razisto prenis lin apud si kaj provis eduki lin, kvazaŭ propran filon. Li fariĝis lerta, sperta fakulo kaj eĉ jam akiris postenon kun bona salajro, pli multa, ol la mezkutima. Tamen li unufoje sen vorto malaperis, eĉ dankon ne diris al sia flegpatro, li nur sciigis per iu, ke li serĉas ion alian, ne venos plu en la laborejon. Eĉ vorton ne skribis. Alia okazintaĵo : Iu rakontas, ke li estus devinta renkonti talentan, sed helpon bezonantan junulon. Sed li ne aperis je la difinita tempo. Nur sekvan tagon telefonis kaj ridetante, kvazaŭ por ne gravaĵo, rakontis, ke li simple « forgesis » la priparolitan, en lia intereso gravan renkonton. Eĉ li aldonis, ke li ne telefonis, ĉar de lia loĝejo la telefonbudeto estas « nur 500 metrojn » malproksime. Li ne pensis pri tio ke tio, kion li faris, ne estis honesta afero.

Tria okazo — nur okaze rakontita — « Je la naskotago de mia fileto — diris patro — oni invitis kelkajn kamaradojn liajn. Kiam ili foriris, eĉ ne unu pensis pri tio : danki la gastigon. Ankaŭ tiuj, kiuj loĝas pli malproksime kaj mi hejmenkundukis ilin, ne pensis pri tio, ke ili danku la akompanon. En la pordego ni eĉ per kelkaj vortoj ne menciis al la cetere saĝaj, amindaj knabetoj, kiuj pli multe lernas, scias, ol ni sciis en ilia aĝo, ke ne estas honesta afero tiel disiĝi. Mi ne kredas, ke mi faris bonan servon per mia silentado ».

Menciinde estas, ke la pli antaŭaj rakontantoj la samon diris : ili ne riproĉis la junulojn, kiuj montris nedankemon, malĝentilecon — pro amo, certe pro falsa amo, pro falsa indulgo !

Profesoro rakontis pri disĉiplo : ke mankas la dankema sento. Tute junan instruiston — kiel multajn aliajn — la ŝtato sendis eksterlanden al studvojaĝo. Li hejmvenis kun tie aĉetitaj multaj objektoj (vestaĵo,

foto-aparato, skribmaŝino, ktp). Liaj gepatroj estas vilaĝanoj, kiuj eble eĉ ĝis la ĉefurbo ne povis siatempe vojaĝi. Kaj la junulo ne parolis pri la ebleco, ke li povis el la vojaĝhelpo eĉ tiaaĵojn akiri por si, ke oni elligis fari belan studvojaĝon, li parolis nur pri la multega laboro, kiu lin atendis alilande. Kiel tiu edukos la pli junajn? Kiel lia profesoro diris « la pli junajn animojn »!

Nun tiel daŭrigas la artikolo: « Car sub la « eduko de la animoj » oni komprenu kaj unuavice komprenu la energian sintenadon! ». Kion la plenaĝuloj en la supraj okazoj ne aplikis! « Sed — unuavice la interparolon kun la gejunuloj, kun la infanoj ».

En laborista kunsido ekstaris maljuna laboristo kaj jene parolis: « Kaj mi ne estos kontenta, ĝis mi ne povos regule konstante paroli kun la junularo pri la multmila mizero de nia malnova laborista vivo ».

Jes, oni devas ankaŭ tion instrui, kia estis la vivo de la gepatroj, kiel penis, luktis kaj progresis la antaŭuloj, kio estas nun — verŝajne en ĉiu lando — je ilia dispono: pli multe, pli valore, pli facile, pli da komforto, pli da ebleco, ol por la antaŭ ili vivintoj. Iu rakontis, kiel malaltan postenon li tiam havis — relative malaltan — por eta salajro li devis balai la ejon, portadi la varojn. Ĉu li hontis tion rakonti al sia filo? Ne, simple li « pro oportuneco, komforto neniam parolis pri ĝi ». Kiel ofte okazas, ke ni aĉetas ian malkaran ludilon, sukeraĵon al la infanoj, nur ili lasu nin nun senĝene, iom ripozi, iom legi. Efektive oni ja devas ankaŭ ripozi. Sed mi prokrastas de tago al tago la kelkminutan priparolon kun la infanoj: pri la aferoj de la mondo, pri la arto, pri la muziko kaj ekzemple ankaŭ pri tiuj tiom « abstraktaj » kaj tamen vivantaj problemoj, kiel la honesteco, la honoro, la ĝentileco, ktp. Kaj ja ni estas la mastroj, la posedantoj de la plej granda valoro de la lando: de la infanoj! Tamen ofte ni diras nur kun rezigna gesto: « Ho tiuj junuloj ».

Estus interese kaj utile, se oni daŭrigus tiun ĉi temon kaj el kelkaj aliaj landoj venus opinioj, ekzemple spertoj, konsiloj. Antaŭ nelonge mi legis ke oni plendas pri la sveda junularo pro ne sufiĉe serioza vivado, troa uzado de alkoholaj trinkaĵoj, memmortigoj! En ĉiu lando estas similaj aŭ aliaj malĝojaj spertoj pri la junularo. Devo estas de la pedagogoj, de ĉiuj seriozaj homoj, kiuj preparas la estonton kaj volas iom influi la junularon — kaj certe tion certagrade faras la esperantistoj! — ke ili priparolu tiun por la tuta homaro gravan demandon, antaŭ internacia forumo, kia estu I.P.R.

Pal BALKANYI, el Budapeŝto.

**LA EDUKADO DE LA POSTMILITA GENERACIO** frontas al gravaj problemoj en tre diversaj landoj.

I.P.R. publikigos en sekva numero artikolon ĉerpitan el angla gazeto, kiu prezentas la problemon kaj sugestas solvon.

Ĉu en **VIA** lando, ekzistas simila problemo? Verku aŭ traduku pri la temo!

## NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

**THEODOR ĈEJKA** instruisto, verkisto, kultura kaj socia agado, pioniro de Esperanto en Ĉeĥoslovakio, la unua redaktoro de I.P.R., (vidu I.P.R. n° 10, 1956 kaj n° 6, 1957) mortis la 26-an de novembro 1957 en Bystrice sub Hostyn en Ĉeĥoslovakio, 79-jara. Al funebrantaj vidvino Dobroslava kaj filo prof. M. ĈEJKA ni kondolencas kore.

Redakcio de I.P.R.

# Subtenenda Entrepreno

Samideano Rüdigier EICHHOLZ estas apenaŭ ekkonata kiel la oficiala zorganto de la nove fondita « *Magnetofona Servo* » de UEA kaj nun ni ekkonas lian alian entreprenon « *Esperanto-Press* » (Oakville, Ont., Kanado). Tiu presejo aparte konvenos por laboraĵoj, kiuj ne estus tiom ampleksaj, ke ili pravigus kostojn de ordinara presado. Mallonge ĝi funkcias per varitajpilo kaj ofseta tekniko. Petu informojn de Esperanto-Press.

S-ano R. EICHHOLZ ne nur proponas la servojn de sia presejo sed intencas mem eldoni. Lia unua eldonado ŝuldiĝas al la fakto ke li apartenas al tiuj malmultaj centoj da kuraĝuloj, kiuj volas heredigi Esperanton al siaj infanoj ek de la plej junaj jaroj. Li certe mem tre bone sukcesis; li ankaŭ vidis la malfacilaĵojn kaj nun li volas helpi la gepatrojn per praktikaj helpiloj. Pri tiu lasta entrepreno mi volas diri kelkajn vortojn.

En la diversaj naciaj lingvoj ekzistas plej malsamaj serioj da belaj kolorlibroj por infanoj el diversaj aĝoj. Presado de tiaj libroj kostas multon. Tio eblas nur ĉe granda klientaro. Oni eble povos repensi la problemon, se la plimulto de la nunaj esperantistoj edukos siajn infanojn ankaŭ esperantlingve. Sed ni ne estas ĉe tia stadio. Alia solvo estas peti de specialigita firmao, ke ĝi lasu al ni siajn kliŝojn kaj permesu al ni esperantan eldonon. Tion oni provis, ekzemple en Francio. Vane. Tio ne interesas la firmaojn. De Kanado venas alia solvo.

Esperanto-Press aĉetis certan kvanton da anglalingvaj infanlibroj; ĝi pretigis kaj presis la tradukon sur apartaj folioj. Fine ĝi detondis kaj gluis la tekstojn en la ĝustaj lokoj. La afero komplikiĝas per tio ke ankaŭ la kovrilon necesas tiel aranĝi.

Sufiĉe da manlaboro necesas kaj tute preta libro devas esti vendata po unu dolaro. Tamen « por ke ankaŭ neriĉaj gepatroj povu aĉeti tiujn librojn, ni vendas ilin ankaŭ kiel « *faru-vi-mem-librojn* » ne tute pretigitajn laŭ du gradoj :

a) Anglalingva libreto kun sur folioj presita esperanta teksto, kun ĉiu materialo necesa por la bindo kaj kun detalaj indikoj kiel bindi kaj surglui la tekston. Po libro 0,45 dol. (ĉirkaŭ 2-3 horojn da laboro).

b) Same kiel a) sed kun jam bindita kovrilo kaj kun jam distranĉita, sed ankoraŭ ne engluita esperanta teksto. Po libro 0,70 dol. (Ĉirkaŭ 1 horon da laboro).

Krome la speco a) estas rekomendata nur al personoj kun iom da sperto pri librobindado. La pretigo laŭ b) estas facile farebla.

Ek de nun estas haveblaj kvar libroj kaj la intenco estas eldoni ankoraŭ aliajn, se tiuj estigas sufiĉan reehon. Ni diros kelkajn vortojn pri ĉiuj el ili.

**Mia frateto** (Precipe por 2-5-jaraj infanoj).

Pli granda knabineto prizorgas la etan frateton de la mateno ĝis la vespero. Simpla lingvaĵo laŭ la infana stilo.

**Domoj** (Precipe por 5-9-jaraj infanoj).

Ĉiuj homoj havas domojn, sed ili tre malsamas tra la mondo laŭ la bezonoj kaj la eblecoj. Tion ilustras la bildoj kiuj kondukas nin de unu ekstremo al la alia sur la tuta terglobo.

**Lanjo montras la vojon** (Precipe por 6-10-jaraj infanoj).

La hundo Lanjo estas rabita sed sukcesas eskapi kaj retrovi sian etan mastron. Ambaŭ sekvas vojon kaj trovas la kaŝejon de la rabisto. Tre streĉa rakonto, tre bone komprenebla eĉ por pli junaj infanoj, kiuj vigle interesiĝas.

**Penjo kaj ŝiaj amikoj** (Illustrita per kolorfotoj de Walt-Disney filmo) precipe por -jaraj infanoj).

La eta sciuro Penjo travivas jaron en la granda arbaro meze de la naturaj embuskoj. Belegaj fotoj kiuj nur per si mem igas dezirinda la libron. Bona infanteksto.

La kvar libroj aperas sub lavebla kovrilo. Ili ja ne estas perfektaj en tiu senco, ke regluado de la bindaĵo kaj surgluo de la tekstoj, eĉ kiel eble plej bone faritaj, ne povas valori originalan prezenton. Sed estas la sola ebleco, kiun ni havas nuntempe por infanlibroj. Kaj tiu solvo estas bonega !

La tradukojn ni devas juĝi nur laŭ jena kriterio : Ĉu la lingvaĵo taŭgas por infanoj, por denaskaj esperantistoj ? Fakte nova tereno por multaj. Eble niaj konceptoj evoluos. Sed ĉi-rilate mi opinias, ke tiu unua provo estas plene sukcesa, kaj ke oni nepre plezurigos esperantoparolantan infanon, kiu ja senpene komprenos. Aliparte tiuj libroj povas utili al iom pli aĝaj infanoj instruataj pri Esperanto, kiel unuaj legaĵoj.

Mi tre vigle rekomendas al esperantistaj gepatroj aĉeti tiujn librojn por instigi siajn junajn infanojn al interesiĝo pri nia lingvo.

A. A.

# INFANA PENTROARTO

★

Ekspozicio de infandesegnoj prezentita en Bourbon-l'Archambault kaj en Bessay (Allier, Francio) okaze de la Kantonaj Festoj estas kreo de lernantoj 8-11-jaraj, kiuj kutimas libere sin esprimi per linioj kaj koloroj.

Tie ekvidis lumon stranga mondo, konsterniga por plenkreskulo, mondo, kiu sub ŝajna burleskeco, sin rigardas kiel tre serioza.

Pejzaĵoj, tre dense konstruitaj, prezentas ĉielojn saturitajn per ultramaro, kobalto, karmino, cinabro, blanko kaj nigro, grundojn cindrokovritajn kiel fornaj parioj aŭ florriĉajn kiel en neebla printempo. La pentristo ne provis kopii, kion ni konvencie nomas la realon, sed li provis solvi plastikan problemon: harmoniigi kolorojn kaj valorojn. Li transponis. Li rekreis.

La homa vizaĝo, sufiĉe ofte reduktita al geometria, foje estas reknedita kiel mola tero, kvazaŭ per ĝia deformigo, la infano volus venĝi sin kontraŭ oni ne scias kiu.



Jena kliŝita desegno havas propran historion:
« Foje kulinartisto invitis sian pli junan fraton tagmanĝi kaj li surtabligis bele dekoritan fiŝon. La infano neniam estis vidinta ion tiel belan. Sub la impreso li pentris ĝin. Alloga plado! ĉu ne?

Jen batalo kiu tordas la armaĵojn, jen kosma sunsubiro, jen vilaĝoj altesidaj al kiuj grimpas neniu vojo, jen ŝtonigita arbo en glacia pejzaĝo, jen silueto de malliberulo post la kadra kruco, jen florplenaj ruinoj, ĉielo en plena helo kie ankoraŭ brilas la nokta stelaro, jen pendumito superflugata de aviadilo. Al kiu universo ili apartenas?

Memoroj, revoj, observoj, deziroj, timoj: ĉiam sin mem la infano projekcias en sian pentraĵon kun pasia konvinko.

En la ĝojo de la kreo, li foje prenas liberecon rilate la teknikojn: li farbas per la tubo aŭ per io ajn, kiun li havas sub la mano; sed, ĝenerale, li preferas uzi « seriozajn » materialojn, ĉi kiujn uzas la « veraj artistoj ».

Guaŝo superregas: tiu farbo plaĉas al infanoj. Multaj ŝatas la belajn pastojn kun netaj kolornuancoj, kiujn oni ŝmiras sur la paperon, sen antaŭa desegno, per vastaj platigoj. Foje blankoj sen kontrasto, grizoj, helaj aŭ malhelaj ĉirkaŭaĵoj izolas fortajn tonojn, kreante ripozzonojn, kiuj igas ke tre laŭte kantas la cinabroj, ultramaroj, violezoj *, flavoj, oranĝezoj *, verdoj pli malpli acidaj, apudmetitaj kun ega aŭdaco. Ol pura koloro iuj infanoj preferas rompitajn tonojn kun obtuzaj kaj profundaj resonoj; aliaj, la delikatajn harmoniojn surbaze de nuancitaj grizoj.

(*) ezo: *sufikso por formi nomojn de kolornuancoj kaj koloraspektoj.*

Akvarelo havas siajn fidelulojn. Iliaj provoj, malpli spektaklodonaj, agrable freŝas kun siaj tre teneraj rozkoloroj kaj bluoj.

Grasaj krajonoj sur malhela fono, inka farbo kunportas apartajn notojn.

La tranĉitaj paperoj devigas la infanojn konstrui la formon per koloro kaj stilizi. Kaj tio, de temp' al tempo estas bonega.

Desegno per plumo trempita en inko aŭ en kloreca akvo kun konturo fer-drateska, enpremante spacoparton en linioludo, kreas formojn, el de la ekstero; ĝi estas la necesa komplemento de la per-makula pentrado.

Diversi en la teknikoj, fakte estas nepre necesa. Kio kalkulas, finfine, ne estas tiel multe pentri per tio aŭ tio ĉi, sed esprimi sin sincere kaj libere. Ĉiu tekniko estas valida se ĝi alportas al la homo rimedon de internaj liberigo kaj riĉigo.

Ch. DEJOUX,

el « Jeunesse » (Allier) n° 16-julio 1957.
kun permeso tradukis A. A.

# ZAMENHOF MONUMENTO EN WIEN

La 27-an de julio 1958 okazos en WIEN la inaŭguro de inda ZAMENHOF-MONUMENTO, la unua tia en la ĉefurbo de iu ŝtato. La necesa mono alfluas bone kaj ĉiu, kiu deziras kontribui sian obolon, povos tion fari sendante aŭ resp. kuponojn aŭ bankbiletojn (dolaroj, funtoj, guldenoj, svis. kaj fr. frankoj, Dmarkoj, liroj, danaj, norvegaj kaj svedaj Kronoj) en letero, aŭ per ĉeko, kio estas pli multekosta. Multaj sendis la obolon en leteroj. Kiu sendos almenaŭ 5 r. k. aŭ egalvaloron ricevos monument-foton kun la okaza Esperanto-poŝtstampo. Kiu donacos pli, estos ankaŭ eternigita sur la dokumento, enmurigota en la soklo de la monumento.

Niaj samideanoj la urbestro de Wien Franz JONAS kaj em.ministro kaj nuna prezidento de Kalkulkontrolejo Inĝ.Dro, doc. Hans FRENZEL eniris la Honor-Komitaton.

Adreso: Internacia Esperanto-Muzeo en Wien (Monumenta Komitato), WIEN I. Hofburg.

★

## KATALOGO DE IEMW

La 1-a parto pri la kolektoj de Esperanto-presaĵoj, 461-paĝa, kun afranko 38 resp. kup. (46 steloj), por ne-membroj de IEMW 41 r.k. (49 steloj).

La 2-a parto pri la « Sistemoj kaj provoj de Internacia Lingvo » (Volapük, Ido, Interlingue, Interlingua, ktp.) fine de februaro je via dispono. Proksimume 50-paĝa. Prezo ne ankoraŭ fiksita. Ambaŭ mendeblaj ĉe IEMW.

# NIAJ PERANTOJ

**AUSTRA: O. St. R., Dr E. J. Goerlich,** Wien, IX, Waehringerstrasse 59. Poŝtĉeka konto: 30 461. Jarabono: 32 aŭstraj ŝilingoj.

**BRAZILA: Cooperativa Cultural dos esperantistas,** Caixa postal 3 881 Rio de Janeiro D.F. Jarabono: 90 Kruzeroj.

**BRITA: The British Esperanto Association,** 140 Holland Park Ave., London, W 11. Jarabono: 9 ŝilingoj.

**BULGARA: Bulgara Esperantista Asocio,** Bul. Stalin 40, Sofia. Jarabono: 9 levoj.

**DANA: Dansk Esperanto-Ferlag,** Ingemannsvej 9, Aabyhoj. Poŝtĉeka konto: 16 295. Jarabono: 9 kronoj.

**GERMANA: Helmut Rössler,** 22b, St-Martin. Poŝtĉeka konto: 43 357 Ludwigshafen/Rhein. Jarabono: 5 markoj.

**HISPANA: E. Calvet,** Pl. Gral. Sanjurjo, 7, Tarragona. Konto N° 956 293 ĉe Banco Espanol de Credito. Jarabono: 55 pesetoj.

**HUNGARA: Martin Lajos,** Esperanto, Bors-u-2, Budapest XII. Jarabono: 24 forintoj.

**ITALA: Eduardo Zumbo,** Casella Postale 226, Torino. Jarabono: 750 liroj.

**JUGOSLAVA: Josip Vajdlih,** Podolje 15, Zagreb. Poŝtĉeka Konto: Gradska ŝtedionica, Zagreb, 40 KB 6, N° 4 653. Jarabono: 410 dinaroj.

**KANADA: Rüdiger Eichholz,** Esperanto Press, Oakville, Ont. Jarabono: 1,25 dolaroj.

**NORVEGA: Erling Holten,** Leangen i Strinda. Jarabono: kronoj. 9.

**NEDERLANDA: Verbruggen,** Oosterhesselenstraat 560, Den Haag. Jarabono: 3,5 guldenoj.

**POLA: Asocio de Esperantistoj en Pollando,** ul. Kozia 3, Varsovio. Jarabono: 50 zlotoj.

**SOVET-UNIA: Roberto Dvorkin,** Esperanto-Sekcio de Kulturdomo, Leningrad 22, Kirovskij 42.

**SUOMA: Joel Vilkki,** Somero. Poŝtĉeka konto: Tu 60 253. Jarabono. 400 markoj.

**SVEDA: Eldona Societo Esperanto,** Box 7 043, Malmö 7. Poŝtĉeka konto: 578. Jarabono: 6 kronoj.

**SVISA: Grajnoj en Vento,** IV-a 9 485, Marcel Erbetta, 66, rue des Pins, Bienne-Biel 7. Jarabono: 5 svisaj frankoj.

**USONA: Jarvis E. Bush,** 3 700 North 75-th Street, Milwaukee 16, Wisconsin. Jarabono: 1,5 dolaroj.

---

**ALIAJ LANDOJ:** Sin turni al nia administranto: **R. Delagneau,** Avrolles, par Saint-Florentin (Yonne), Francio, Poŝtĉeka konto: Dijon, N° 1448 87. Provizore la landaj perantoj kaj ĉefdelegitoj de U.E.A. peras la abonojn: Jarabono: 500 francaj frankoj, aŭ 17 steloj, aŭ 12 internaciaj respondkuponoj. Ni daŭre serĉas perantojn.

## *NOVA LERNOLIBRO*

duagrada

# "POR LA PRAKTIKANTOJ"

multaj ilustraĵoj

**20 lecionoj**

verkis S-ro P. BABIN

Profesoro pri angla lingvo

450 F. aŭ 15 steloj - afrankite

**E. BIDOIT, 6, rue de la Paix, BAUGÉ (M.-et-L.)**

C. C. NANTES : 1438-67


## ATENTU

Anoncoj, reklamoj por FRANCIO, vi aperigu en « Esperanto et Culture », eldonnombro 1000 — Skribu al: Fino G. JOUBERT, 21, rue Regnault — ST-QUENTIN (Aisne) FRANCIO — Samaj kondiĉoj kiel por anoncoj en I.P.R. — PĈK: LILLE n° 3041-30.

**I. P. R. - PROVSENDOJ**

Sendu adresojn de interesotaj personoj (geinstruistoj) ne abonantoj cele al provsendaĵoj al:

Sro DELAGNEAU — Avrolles par ST-FLORENTIN (Yonne) FRANCIO

## ANONCETOJ


**« LA FARAONO »**

de BOLESLAW PRUS

tradukis KABE

3 volumoj: 296-358 kaj 307 paĝoj 14,5×20,5 cm, binditaj

2600 F aŭ 87 steloj — afrankite

Sro - E. BIDOIT, 6, rue de la Paix BAUGÉ (M.-et-L.)

**« VEGETARANO »**

Aperis « Vegetarano », eldono de Tutmonda E - Vegetara Asocio.

Havebla ĉe: Betty Larsen Gl. Strandvej 288 HUMLEBACK (Danlando) (2 rpk po kajero).

**« EL POPOLA ĈINIO »**

Post 4-jara silentado « El Popola Ĉinio » reaperas per 32 ilustritaj paĝoj sub belega kolora kovrilo ; ĝi estas eldonata de Ĉina E-Ligo mem kaj ne plu de la Fremdlingva Eldonejo; ĝi lasos pli da spaco al ĉinaj literaturo kaj E-movado. Ĉina E-Ligo: P.O. Kesto 77-Pekino-Ĉinio.

**« POR ĈIU MALSANO »**

Herbteon — Recepton, sendas

Inĝ - B. MOLNAR

Naprstkova, 9, PRAHA, 1

Aldonu 2 respondkuponojn

**INTERLINGVISTIKA INFORMA SERVO**

Organo de la Societo por Internacia Lingvo. Jam aperis du numeroj kun tre gravaj artikoloj - Interesuloj sin turnu al: Dro A. BORMANN Blücherstrasse 17. FLENSBURG-MURWIK (Germanujo).

**I. R. A. M.**

preparas por 1958 tutmondan kampajnon de opinio kontraŭ malsato. Ni invitas niajn legantojn, kiuj havas amikojn aŭ rilatojn en Azio, Afriko, Sudameriko kaj Oceanio povanta'n kunlabori por preparado de tiu kampanjo konigi al la sekretario de IRAM 32, rue des Bourdonnais, PARIS (1er) - Francio, la nomojn kaj adresojn de tiuj personoj. Ni antaŭdankas ilin.



IMPRIMERIE A. POTTIER et Cie — MOULINS.
Dépôt légal : n° 12, 1er trimestre 1958.

*Le Directeur-Gérant* : G. MUSSIER.